

Prelego de Dennis Keefe pri Esperanto kaj parte pri Ĉinio kaj kolonialismo.  
(Le Mans, en novembro 2018).

Kiu estas Dennis Keefe ?

Dennis Keefe estis elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2011, laŭ la revuo La Ondo de Esperanto, pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio.

Cetere, li verkis la BEK-on kiu signifas “Baza EKzercaro” aŭ “Baza Esperanto-Kursaro”.

Plie, Dennis Keefe organizis “Lingva Festivalo”-n por montri la strukturojn de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

Pro tiaj trajtoj de la esperantista sperto de Dennis Keefe, la grupo GEM povis ekveki la intereson de Pierre Salam, direktoro de la domo de lingvoj « Maison des langues » en la universitato « du Maine » en Le Mans. Li akceptis afable inviti Dennis Keefe por ke li prezentu Esperanton al kelkaj studentoj.

Finfine, Dennis Keefe faris france prezentadon de Esperanto direktitan al la studentoj.

Fakte, proksimume 25 fremdaj studentoj, kiuj lernas la francan lingvon en la domo de lingvoj, aŭdis la prelegon.

Profitante de la ĉeesto de pluraj ĉinaj gestudentoj kaj de sia propra travivo en la Nankina universitato, Dennis Keefe starigis la problemon de interkomunikado en Ĉinio. Li diris, ke en la urbo Nankino, kie li laboris, multaj homoj ne komprenas la oficialan mandarenan lingvon. Dennis Keefe saĝe ne aludis la lingvan politikon de la komunista partio kiu elektis la mandarenan lingvon, sed li sugestis la intereson de Esperanto kiel neŭtrala lingvo por interparoli libere kaj sen hierarkiaj premoj de iu teorie grava lingvo rilate aliajn malsuperajn.

Tio estas nur unu aspekto de la prelego de Keefe, sed mi opinias, ke la psikologiaj lingvaj bremsoj ekzistas, eĉ persistas, laŭ sociaj situacioj, aŭ bezonas esti en nia konscienco. Retour ligne manuel Ekzemple, antaŭ deko da tagoj estis la 75a datreveno de la libero de la nazia lagero Auschwitz en Pollando. Iu juda postvivantino, kiu lernis la germanan lingvon en sia hebrea familio, klarigis, ke ĝis nun ŝi ne povas (pro mensaj motivoj) paroli germane kun germanoj, sed nur angle. Tre normala estas tiu sinteno : elekti germanan lingvon signifas pro tio agnoski al nazismo statuton de oficiala homa ideologio, kiun ŝi nek povas nek devas akcepti.

Alia problemo aperas ĉar ĝi supozas, ke en si mem oni havas sufiĉe da morala distanco kaj persona ebleco por superi siajn antaŭjuĝojn. Tiam oni devas agnoski, ke en iu ajn socio, iu ajn lingvo ekzistas kritikaj tendencoj, kiuj donas okazojn por nuanci kaj elmontri novajn starpunktojn.

Speciale pri la nazismo, en kaj ekster Germanio, eĉ ekde la komenco de tiu socia degenero, la germanoj de pluraj tendencoj sturmis voĉe kaj armile kontraŭ la musolina faŝismo (sen rasa deliro) kaj nazismo (faŝismo kun rasteorio).

Tamen, rilate la kontraŭstaron al la kolonialismo ŝajne malaperita en Afriko kaj norda aŭ suda Ameriko, mi bedaŭras, ke la franca kaj la angla lingvo servas por unuigi landojn, kiuj vivis sub la olda kaj la moderna kolonia jugo (vidu la francan armeon en Mali kaj en aliaj landoj aŭ la kanadan transnacionan entreprenon Barrick Gold en Ameriko aŭ en aliaj kontinentoj).

Por reveni al la okazo de la rifuzo paroli germane de la hebrea postvivantino :

- la angla kaj hispana kolonialisma genocido de amerikanaj originaj popoloj ;

- la afrika-franca kolonialisma ekspluato ;

- (kun ambaŭ neforgesema spuro ĝis nun) morale kaj politike (eĉ en la vundita haŭto), malpermesas uzi dum interŝanĝoj la anglan kaj hispanan lingvojn !

Cetere, ili ne povas speguli la afrika-amerikan originan popolan kulturon nek vortojn kunspinantajn teron, naturon, faŭnon, ktp.

Evidente, la problemo estos elekti iun unuigitan lingvon inter dudeko, (kial ne Esperanton ?), aŭ uzi alternative du lingvojn ĉiujn 4 jarojn.

La solvo koncernos la afrikajn kaj amerikajn etnojn, kiuj nepre devus pripensi la necesajn rimedojn.

Frank Mintz

---

Kiu estas Dennis Keefe ?

Dennis Keefe estis elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2011, laŭ la revuo La Ondo de Esperanto, pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio.

Cetere, li verkis la BEK-on kiu signifas “Baza EKzercaro” aŭ “Baza Esperanto-Kursaro”.

Plie, Dennis Keefe organizis “Lingva Festivalo”-n por montri la strukturojn de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

Pro tiaj trajtoj de la esperantista sperto de Dennis Keefe la grupo GEM povis ekveki la intereson de Pierre Salam, direktoro de la domo de lingvoj « Maison des langues » en la universitato « du Maine » en Le Mans. Li akceptis afable inviti Dennis Keefe por ke li prezentu Esperanton al kelkaj studentoj.

Finfine, Dennis Keefe faris france prezentadon de Esperanto direktitan al la studentoj.

Fakte, proksimume 25 fremdaj studentoj, kiuj lernas la francan lingvon en la domo de lingvoj, aŭdis la prelegon.

Profitante de la ĉeesto de pluraj ĉinaj gestudentoj kaj de sia propra travivo en la Nankina universitato, Dennis Keefe starigis la problemon de interkomunikado en Ĉinio. Li diris, ke en la urbo Nankino, kie li laboris, multaj homoj ne komprenas la oficialan mandarenan lingvon. Dennis Keefe saĝe ne aludis la lingvan politikon de la komunista partio kiu elektis la mandarenan lingvon, sed li sugestis la intereson de Esperanto kiel neŭtrala lingvo por interparoli libere kaj sen hierarkiaj premoj de iu teorie grava lingvo rilate aliajn malsuperajn.

Tio estas nur unu aspekto de la prelego de Keefe, sed mi opinias, ke la psikologiaj lingvaj bremsoj ekzistas, eĉ persistas, laŭ sociaj situacioj, aŭ bezonas esti en nia konscienco.

Ekzemple, antaŭ deko da tagoj estis la 75a datreveno de la libero de la nazia lagero Auschwitz en Pollando. Iu juda postvivantino, kiu lernis la germanan lingvon en sia hebrea familio, klarigis, ke ĝis nun ŝi ne povas (pro mensaj motivoj) paroli germane kun germanoj, sed nur angle. Tre normala estas tiu sinteno : elekti germanan lingvon signifas (pro tio)

agnoski al nazismo statuton de oficiala homa ideologio, kiun ŝi nek povas nek devas akcepti.

Alia problemo aperas ĉar ĝi supozas, ke en si mem oni havas sufiĉe da morala distanco kaj persona ebleco por superi siajn antaŭjuĝojn. Tiam oni devas agnoski, ke en iu ajn socio, iu ajn lingvo ekzistas kritikaj tendencoj, kiuj donas okazojn por nuanci kaj elmontri novajn starpunktojn.

Speciale pri la nazismo, en kaj ekster Germanio, eĉ ekde la komenco de tiu socia degenero, la germanoj de pluraj tendencoj sturmis voĉe kaj armile kontraŭ la musolina faŝismo (sen rasa deliro) kaj nazismo (faŝismo kun rasteorio).

Tamen, rilate la kontraŭstaron al la kolonialismo ŝajne malaperita en Afriko kaj norda aŭ suda

Ameriko, mi bedaŭras, ke la franca kaj la angla lingvo servas por unuigi landojn, kiuj vivis sub la olda kaj la moderna kolonia jugo (vidu la francan armeon en Mali kaj en aliaj landoj aŭ la kanadan transnacionan entreprenon Barrick Gold en Ameriko aŭ en aliaj kontinentoj).

Por reveni al la okazo de la rifuzo paroli germane de la hebrea postvivantino :

- la angla kaj hispana kolonialisma genocido de amerikanaj originaj popoloj ;

- la afrika-franca kolonialisma ekspluato ;

- (kun ambaŭ neforgesema spuro ĝis nun) morale kaj politike (eĉ en la vundita haŭto), malpermesas uzi dum interŝanĝoj la anglan kaj hispanan lingvojn !

Cetere, ili ne povas speguli la afrika-amerikan originan popolan kulturon nek vortojn kunspinantajn teron, naturon, faŭnon, ktp.

Evidente, la problemo estos elekti iun unuigitan lingvon inter dudeko, (kial ne Esperanton ?), aŭ uzi alternative du lingvojn ĉiujn 4 jarojn.

La solvo koncernos la afrikajn kaj amerikajn etnojn, kiuj nepre devus pripensi la necesajn rimedojn.

Frank Mintz